pdf. iompostiom .net 003

internacia reta printebla gazeteto – kompostita el retaj fontoj – por sur la tablo en esperantaj kluboj

Esperante

Litovaj panoramoj en Esperanto

Legu la plenan artikolon en esperantujo.org

Litova entrepreno “Moderniu elektroniniu technologiju komunikacijos” (Komunikado per modernaj elektronaj teknologioj) en 2006 lanĉis unikan retan projekton “Lietuva panoramose” (Litovio en panoramoj), ĝia retejo estas www.panoramas.lt . La projekto funkcias en germana, angla, litova, pola, rusa kaj ekde la 12a de Aprilo, 2007 ankaŭ en Esperanto. Tamen ĉefaj lingvoj de la projekto estas litova, angla kaj Esperanto. Celo de la projekto estas montri Litovion en tute alia formo – per virtualaj panoramaj vidaĵoj. Ĝi estas destinita por turistoj kaj ĝenerale homoj, kiuj interesiĝas pri Litovio. Laŭ la autoroj de la projekto ĝi estas unika en Eŭropo kaj eble eĉ en la tuta mondo. La projekto estas apogata de Litovia Registaro.

Agende

Legu pli da eventoj ĉe ttt.mondakalendaro.org

Primitiva Renkontiĝo

La 16a ĝis la 20a de majo

Ĉu vi ŝatas renkonti viajn amikojn en mojosa etoso? Ĉu vi volas ekkoni novajn amikojn dum gemuta nederlandumado? Tio eblos dum la Primitiva Renkontiĝo en Den Dolder, Nederlando. Ni invitas vin ludi, babili, muziki kaj ekskursi en nia primitivejo, 16 - 20 de majo 2007.

MeKaRo: Mez-Kanada Renkontiĝo

La 19a ĝis la 21a de majo

En majo 2007, la renkontiĝo okazos en Montrealo.

Pliaj informoj rete: http://www.esperanto.qc.ca/

Bilde

Foto de **toljuʻo** el Flickr.com

Interrete

Vikipedio

http://eo.wikipedia.org

Unu el la plej grandaj retejoj havas ankaŭ tre grandan Esperantan version. Kunlaboru!

FESTO 2007

http://esperanto-jeunes.org/festo2007/

Multaj disaj informoj pri granda Esperanta okazaĵo en Francio.

Myspace de FESTO 2007

http://myspace.com/festo2007